

Unuo 1

Pri la universitato kiel ne taŭga loko por Esperante labori

Ĉefe ekde la 8a jardeko de la pasinta jarcento, disvastigis internacian manieron pensi la universitaton, kiu nun estas preskaŭ internacie homogena. Naskiĝis inter Britio kaj Usono; ŝanĝiĝis por esti pli konkurema kaj laŭdezaĵe nur atingebla de minoritato; kaj disvastiĝis per la samaj mekanismoj, kiujn regis kaj regas la nomita tutmondiĝo. De ĉiuj landoj oni povas legi artikolojn, kiuj priskribas tion kio okazas ĉe la propra universitato.

Ĉi tiu dosiero klopodas tute mallonge priskribi, (1) kial Esperanto ne povas sukcesi en la nuntempa universitato kaj (2) tion, kion eble ni povos fari por iom ŝanĝi la ĵusan aserton.

Antaŭaj klarigoj

1. Laŭ la studoj pri la homa konduto, oni scias ke:
 - a) La plimulto el la homoj deziras senti, ke ili estas memstaraj, sendependaj aŭ liberaj. Malfacile oni akceptas, ke oni estas influata aŭ ke nur sekvas la decidojn far aliaj.
 - b) Kiam la homaj grupoj ricevas eksteran premejon, ili kutime reagis laŭ unu el du malsamaj manieroj.
 - Se la grupo havas fortan identecon kaj internan adheron, la plej ebla reago estas pli kuniĝi kaj kune lukti kontraŭ la ekstera forto aŭ rezisti.
 - Se la grupo ne estas tia, la plej ebla reago konsistas el unuopa adaptiĝo al la ekstera premo. Alivorte, oni klopodas savi sin mem, kaj tia decido fortigas la premantan mekanismon.
2. La universitato
 - a) estas plenumata de homoj, kiuj
 - deziras senti sin mem sendependaj, liberaj, memstaraj... sed emas obei la premojn, ĉar la individua flanko estas sufiĉe pli ĉefrola ol la grupa, kaj kohere ili kutime elektas la memsavon.
 - sentas ke havas tempon por nenio krom sekvi la *ununuran aranĝitan vojon* (ĉefe atingi publikigaĵojn en la revuoj elektitaj de la premanta mekanismo, kaj rilatiĝi al sukcesaj grupoj aŭ esploristoj). Tia vojo tutmondas. Artikoloj publikigitaj en pluraj malsamaj landoj tute simile priskribas la aferon. Unu el ĝiaj trajtoj estas, ke la premo kreskiĝas kaj konsekvenca la universitataj sentas pli da streĉo ol antaŭe.
 - b) estas tute malfacila loko por proponi *aliajn vojojn*. Esperanto plene loĝas en tiu alia flanko. Do, ĝi restas nevidebla. Se estus videbla, restus neinteresa. Se estus interesa, restus en la aro de interesaj aĵoj, kiujn oni neniam faros.

- c) enhavas studentojn, kiuj estas sufiĉe premantaj de profesoroj kaj de la edukada sistemo. Ili plej eble faros nenion, rilate al Esperanto, se ankaŭ nenion faras profesoroj pri la sama afero.

La flanko vojo

Kutime aktivuloj emas tute rekte argumenti kaj fari. Ekzemple, pli Esperanto la preferatajn argumentojn jam enhavis la jarcenta eseo de Zamenhof *Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia*: (1) bezono de internacia/interpopola komunikado, (2) ne taŭgeco de la naciaj lingvoj, (3) facileco de Esperanto kiel lerninda lingvo, (4) neplibonigeblaj konsekvencoj derivataj de la decido elekti Esperanton. Al ili aldoniĝis poste la propeŭtikeco, la lingvaj rajtoj kaj la ekonomia ŝparego. Sed finfine ĉiam temas pri kialoj. Homoj ne aŭskultas kialojn.

La reklamoj ĉefe laboras pri la nomita "flanka vojo", nome ne rekte pritrakti. La universitato estas plena de homoj kiuj plej eble havas bonan cerbon, bone uzata. Post ĉiu argumento favore al Esperanto, ili donos alian malan. Ne gravas ĉu la argumento havas logikon aŭ estas facile falebla. Gravus ke ŝajnas argumento.

La flanko vojo konsilas ne rekte oferti Esperanton. Ekzemple: oni disvastigas por kolegoj bonan mallongan dokumenton, per la loka lingvo, kiu en la unua paĝo montras "Origina Esperanta titolo:... Tradukita de...". Oni aranĝas projekton kiu ofertas stipendion al studentoj. En la kondiĉoj oni povas legi "Minimume B2 nivelo pri Esperanto". Oni organizas internacian prelegon, ĉeesta aŭ ne, kie la preleganto Esperante parolos kaj la organizantoj zorgas pri la samtempa tradukado. Oni intervjuas usonan aŭ britan faman esploriston, kiu mencias tute nature Esperanton meze de la intervjuo. Neniam oni klopodas rekte konvinki la ceteran pri la lernado/uzado/rekono de la internacia lingvo. Se tio okazas, okazos ĉar la alia sentos tian bezonon.

Profitema sinteno

Se ni havus liston de aferoj, kiuj interesas universitatojn (ĉefe profesorojn, pri aferoj kernaj, gravaj kaj ceteraj), la tasko temus pri enmeti Esperanton kiel eble plej nature en ili. Ekzemple, ni atingas internacian grupon de profesoroj, kiuj kune aranĝas projektojn, publikigas, prelegas ktp kaj inter ni ĉiam uzas Esperanton, ni povos *hazarde* montri tian realon al kolegoj. Ili sentos, ke ne temas pri ideo, nek argumentoj, nek kialoj... sed pri sukcesa realo (mi nomos ĝin *SPS*: Sento pri Sukceso). Se mi estas invitata de alia universitato, kaj la ĉefa kialo estas ke mi parolas Esperanton, aliaj sentos *SPS*-on. Se mi atingas internacian projekton danke al ke la komuna lingvo estas Esperanto, do *SPS*. Temas pri (1) fari la liston, (2) taksu ĉiun listopunkton, (3) trovi manierojn enmeti Esperanton en ĉiuj, (4) strategie aranĝi viĉordon por atingi ĉiun celeton.

Tia propono tute bezonas alian, kiu estas enhavita en alia unuo, pri sistemo de profesoroj esperantistoj.

Unuo 2

Pri la neĉeesta universitata "movigebla" seminario

Celoj

La fundamenton de ĉi tiu agado vi trovos en la unuo 1. Baze temas pri:

1. Ne rekte montri la realon de E-o kiel universitata lingvo.
2. Agadi tute universitate.
3. Kunigi universitatajn esperantistojn danke al konkreta projekto.
4. Allogi kolegojn pri la taŭgeco de la internacia lingvo.
5. Atingi daŭreblan produkton, kiu povas esti ie uzata.
6. Faciligi pozitivan etoson ene de universitatoj pri la aranĝo de kursoj, esploroj, kaj aliaj agadoj rilate al E-o.
7. Elspezi malmulte da mono, rilate al ĉeesta versio.

Priskribo

La agado konsistas el serio de pervideaj prelegoj, aranĝita kiel unuo kadre de universitata seminario. La simpla versio enhavas nur la videojn. La kompleksa inkludas konekton kun la preleganto kaj interparolo kun la publiko post la spektado. La nura lingvo de videoj kaj interparoloj estas E-o. La videoj estas subtitulataj, kaj la interparolo estas apogata per samtempa tradukado.

Temoj

Zorganta pri la sukceso de la agado, oni devas kolekti temojn kiuj plej eble interesos kolegojn de iu ajn fako. Ĝenerale, ĉiuj havas intereson pri kiel sukcese (1) publikigi, (2) havi rilaton kun entreprenoj aŭ aliaj agentoj, (3) atingi subtenon de institucioj, (4) aranĝi internacian teamon, (5) esti invitata de alia universitato, k.s. Aliaj temoj estas la funkciado de la universitato en malsamaj landoj, la taksado de la scienca produktado en universitatoj, la datumbazojn pri revuoj, la tutmondaj universitataj vicordigoj, k.s.

Ne taŭgas tro specifaj temoj, kiuj nur interesas al malmulte da kolegoj. Uzi E-on anstataŭ la anglan aŭ la lokan certe bremzos multajn kolegojn. Do, se ni atingas interesigan temon, malgraŭ la bremsado pluraj kolegoj alvenos. Kaj tia semo donos fruktojn.

Prelegantoj

Temojn kaj prelegantojn oni elektos samtempe. Ni ne estas tiom da homoj por alimaniere fari. Kiu povas prelegi pri la aziaj universitatoj kaj kiel atingi rilaton kun ili? Kiu povas prelegi pri kiel atingi eŭropajn projektojn? Kiu pri la maniero funkcii la merkato de la publikigoj? Kiu pri la trajtoj de la nuntempa tutmonda taksado de la scienca produktado?

Loka teamo

Kiam la serio estos finita, la afero estos surmane de lokaj kolegoj. Ili zorgas pri (1) la reklamo en sia universitato; (2) la bona aranĝo de la loko kaj kondiĉoj; (3) la redakto de fina informo pri la procezo kaj la rezultoj; kaj se la teamo elektas la kompleksan version, ĝi zorgos ankaŭ pri (2) la interparolo kun la prelegantoj, por akordi datojn; kaj (3) la samtempan tradukadon. Se la videoj ankoraŭ ne havas subtitolojn, la loka teamo zorgos pri tio.

Reklamo

La reklamo neniel temas pri E-o, sed pri la kerna temo. E-o nur flanke aperas, por informi ke la lingvo estos ĝi, sed ni havos samtempan tradukadon. Estus bone ke la reklamo enhavu prestigian nomon; ekzemple ESF. Kaj la loka teamo klopodos havi apogon de la propra universitato kaj menciigi ĝin en la afiŝoj kaj aliaj komunikiloj.

Rezultoj

Se (1) la elekto de la temoj estas bone farita, (2) la prelegantoj vere scias pri la temo kaj bone komunikas, (3) la videoj kaj reklamoj estas profesie aranĝitaj, kaj (4) la loka teamo faras bonan laboron, do oni atendas, ke

1. Ne esperantistaj kolegoj malkovros la taŭgecon de E-o kiel universitatilo, havos scivolemon kaj minimume ne bremzos sed plej eble apogos Esperantajn agadojn en la propra universitato.
2. Universitataj kolegoj spertos ke E-o kaj prestigiaj universitataj esploristoj estas reala paro. Do, E-o ne temas pri stranguloj sed normalaj fakuloj, kiuj universitate laboras en pluraj landoj.
3. Kolegoj povos uzi la prelegojn kiel fonton por aliaj sciencaj agadoj, kiel ekzemple publikigoj, disvastigante la originan Esperantan titolon.
4. La loka teamo povos profiti la rezultan etoson por atingi aliajn universitatajn apogojn.
5. Esperantujo havos serion da prelegoj, tute taŭgaj por pluraj celoj, kaj verŝajne pligrandigebla, aldonante aliajn unuojn.

Realigo kaj mona apogo

La projekto bezonas (1) teamon kiu pensu, decidu kaj aranĝu pri ĉiuj paŝoj; (2) specifan laboranton, dungata aŭ stipendiata; (3) institucion kiu donas sian nomon kaj mone apogas.

La teamo decidus la temojn, kontaktiĝas al prelegantoj, decidus la komunan ŝajnon kaj identecon de la serio, kunelektas la laboranton, superrigardas la laboron, interparolas kun la lokaj teamoj ktp.

La laboranton vojaĝas por intervui la prelegantojn, altkvalite registras la videojn, kaj produktas la rezulton, kies enhavo ankaŭ montras teknikajn sciojn, kiel ekzemple manieron miksi videon kun komputila animacio ktp.

Unuo 3

Sistemo por universitataj aktivuloj

Priskribo kaj fundamento

Ĉi tiu projekto temas pri la starigo de internacia reto de universitataj aktivuloj. Ne temas pri esperantistoj, kvankam la sistemo uzos E-on kiel internacia komunikilo.

La projekto uzas la punktojn de la unuo 1: konscias, ke la kutimaj kolegoj ne havas nek havos intereson pri E-o; ke la nuntempa universitato estas subpremataj kaj obeas nur unu vojon. Do, ĉi tiu projekto klopodas atingi subpopolon ene de la universitato: la kolegojn kiuj ankoraŭ sentas sin liberaj kaj luktas por alia universitato.

Tiuj kolegoj ankaŭ ne havas intereson pri E-o, sed ĉiuj el ili kunsupertas la saman simptomaron. Ili:

1. Sentas ke ili estas izola minoritato, kaj ne havas institucian nek kolegan apogon.
2. Ne havas bonajn ilojn por bone aranĝi siajn agadojn.
3. Ne scias pri la samaj agadoj kiujn faras aliaj kolegoj en aliaj universitatoj. Do ĉiuj reinventas la samon plurfoje en malsamaj lokoj kaj tempoj.
4. Energie eklaboras, sed post kelkaj monatoj, pro la premo kaj streco alvenitaj de la universitata ĉiutageco, la energio malpligrandiĝas ĝis la praktika malapero.
5. Kutime estas malbone taksataj de kolegoj, ĉar ili ne elektis la precizan saman vojon kiel la ceteraj.

Aktivuloj kutime samtempe vivas du vivojn: kiel *normala* universitatano kiu esploras, publikigas, instruas ktp. kaj kiel *luktanto* kiu elspezas multe da energio, tempo kaj rimedoj. Tia elspezo damaĝas ilin pri la atingo de la samaj rezultoj, kiuj estas la nuraj celoj de la ceteraj kolegoj. Ĉar la nuntempa universitato estas dezajnata kiel spaco de konkureco, la aktivuloj perdemas kontraŭ la sinsavantoj.

Celoj

1. Tute klare faciligi la agadojn de la universitataj aktivuloj pere de interreta sistemo per kiu oni povas:
 - a) konatiĝi kun aliaj aktivuloj kaj grupoj el aliaj universitatoj kaj landoj, danke al precizaj profiloj kaj specifaj iloj;
 - b) havi aliron al diversaj datumbazoj, bone aranĝitaj, pri agadoj, aktivuloj, spertoj, fakoj,

procezoj, rezultoj, modeloj, gvidoj, iloj, oportunoj, leĝoj, alvokoj ktp.

- c) kunaranĝi agadojn kun aliaj grupoj de malsamaj universitatoj eĉ fremdaj.
 - d) kunuzi universitataĵojn kiel ekzemple esplorilojn, metodologiojn, aliajn retpaĝojn... kiuj faciligos la atingon de esploroj, projektojn, publikigojn ktp.
 - e) atingi konscion kaj potenĉavon, ĉar oni faciligos, ke la sento de izoleco malaperu.
2. Sentigi aktivulojn pri la taŭgeco de E-o kiel komunikilo por la internaciaj agadoj, kunlaborojn ktp.
 3. Ne rekte montri al ceteraj kolegoj la utilecon de E-o almenaŭ por kelkaj el universitatanoj, kiam ili bezonas komuni internacie.

Realigo kaj mona subteno

Ĉi tiu projekto bezonas minimume du homojn, kiuj laboros pri la projekto minimume unu jaron, minimume ses horojn tage. Unu el ili estas fakulo pri programado, ĉefe pri interreta medio. La alia lertas pri komunikado, fakas pri allogo kaj havas kapablon bone komferte interparoli kun aliaj. Ambaŭ estas esperantistoj kaj facile legas, komprenas, pripensas kaj havas ideojn.

La projekto bezonas minimume ses monatojn por fine esti dezajnita, kaj minimume aliaj ses monatojn por esti pruvita kaj plibonigita. Plej eble, pli bona realigo bezonos pli da monatoj.

Post tiu tempo, la sistemo devas esti *preskaŭ* memstara. Oni devas atingi bonan teamon, starigita ekde la propra aktivularo, kiu zorgos pri la pligrandiĝo kaj bona funkcio de la sistemo.

Nuntempe la universitato estas tute malbona loko por disvastigi E-on. La plejmulto el universitatanoj nur havas orelojn, okulojn kaj manojn por la sama aro da aferoj kiu estas akceptata de la tutmodiĝa universitata sistemo. Nur la aktivuloj reprezentas iom da espero. Sed ili izolas. Ĉi tiuj projekto estas samtempe eksperimento, kiu montras ĉu la aktivularo reale kapablas iel ŝanĝi; kaj samtempe klare meti E-on en la universitaton. Ĉi tiu eksperimento ankaŭ montras ĉu oni povas havi esperon en la aktivularo, ĉar tia celo praktike ne eblas pri la ceteraj.

Unuo 4

Esploro pri la kialoj de sukcesoj kaj ne sukcesoj de universitataj kursoj pri Esperanto

Enkonduko: kio okazas rilate al kursoj

La lastaj raportoj far Germain Pirlot pri la universitataj kursoj pri Esperanto, kaj la Nitobe-raporto far Juan Diego Díaz, klare montris, ke la kvanto da kursoj malkreskas lastajn jarojn. Tamen, ŝajnas ke pri la du lastaj, oni rajtas heziti pensi ĉu la kvanto kreskis aŭ malkreskis. Tiun konkludon oni devas preni sciante, ke ni havas verajn problemojn pri bona informado. Pluraj kursoj okazas, sed la instruistoj ne informas al lokoj aranĝitaj por registri tiajn informojn, kiel Edukado.net aŭ Kunagade. Ŝajnas ke nur Eŭropo pli-malpli bone informas. Tio ne parolas pri la bona konduto de la eŭropanoj, sed plej eble pri kultura biaso, kiu povas malfaciligi la partoprenon de aliaj. Tia konduto meritas esti esplorata, kaj uzi la rezultojn por finfine solvi tiun aferon.

Ni povas antaŭvidi kelkajn problemojn. Krom la jam priskribitaj per antaŭaj unuoj, specife oni havas kvar barilojn pri la atingo de bonaj rezultoj: estas malfacile alveni ĝis studentoj; se oni alvenas, estas malfacile allogi ilin por studi Esperanton; se oni allogas, estas malfacile ke ili finfine aliĝas; se tio okazas, estas malfacile, ke ili tralernos kaj atingos la finon de la kurso. Do, nur iom da kursoj okazas kaj kutime kun malmulte da lernantoj, pluraĵ el kiuj facile forlasis meze de la vojo.

Malgraŭ tia antaŭvido, vere ni bezonas esplori pri la kialoj. Kutime oni demandas al sukcesaj lernantoj aŭ, pli ofte, al instruistoj. Ni bezonas demandi ĉefe al homoj kiu komenciĝis sed ne finiĝis.

Ĉi tiu projekto temas pri ambaŭ esploradoj: kial pluraj instruistoj ne informas; kial kursoj kaj lernantoj malaperas.

Realigo esplorado 1: informado pri kursoj

Ĉar ni parolas pri universitataj kursoj kaj jam per antaŭaj unuoj ni scias ke la universitatoj suferas problemegon pri la disponebla tempo, ni havas du antaŭvidojn rilate al ĉi tiu esplorado: (1) la demandaroj por atingi la informon devas esti simplaj, facilaj, rapide plenumataj, kaj ne havi pli ol bezonataj demandoj; ĉio el ili laŭ la vidpunkto de la respondantoj, ne de la dezajnantoj; (2) la esplorado ne devas temi pri alia demandaro.

En la unua etapo oni demandos al instruistoj kiuj bone informas, por scii pri ŝliaj opinioj rilate al la enhavo de la demandaroj kaj ĝia maniero atingi la informon. En la dua etapo, oni devas atingi instruistojn kiuj ne informis, por scii kialojn. Ambaŭ devas esti aranĝitaj laŭ intervjuo skajpa, zooma aŭ simila, ne per homogena demandaro. La rezultojn de tiuj movoj utilos por (1) elekti ununuran retpaĝon por enhavi la demandaron, (2) plibonigi la demandaron, (3) plibonigi la manieron plenumi ĝin kaj allogi por tio, (4) decidi rutinan kutimon esplori post iom da tempo.

Oni bezonas atingi spertojn en malsamaj landoj de malsamaj kontinentoj, por ke la esplorado ne havu biason.

Realigo esplorado 2: forlaso de lernantoj

Simile oni kondutos pri ĉi tiu alia afero. La unua etapo konsistas el intervjuoj al lernantoj, kiuj sukcese atingis la finon de la kurso. Ili ankaŭ estis en rilato kun la ceteraj; pro tio ili plej eble scias pri kialoj de forlaso kaj daŭrigo. La rezulto de tiu etapo permesas pli bone fari la duan, kiu temas pri intervjuo al instruistoj. En tiu paŝo la esploristo informos al instruisto pri la vidpunkto de la lernantoj, kaj atingos reagon. Plej eble, ĉeestas tutmondaj kialoj (ĉar la universitata sistemo estas iom homogena), lokaj kialoj (rilate al la maniero reagi de la propra universitato, kaj al la loka kulturo) kaj specifaj (pri la kurso mem, ĝia zorganto ktp). Ĉi tiuj lastaj kompreneble estos la pli facile solveblaj.

La tria etapo konsistas el akordo kun instruistoj de malsamaj kontinentoj, pri la sekvado de iliaj kursoj ekde antaŭ ol komenciĝi. Oni devas rutine intervjui la instruiston kaj minimume unu (plej bone du aŭ tri) el lernantoj. La sekvado faciligos scii pri la ŝanĝiĝo de atendoj, spertoj, celoj ktp; rimarki damaĝojn kaj oportunojn, kaj finfine konsili aŭ rekomendi ion por plibonigi la sekvantajn spertojn.

La teamo kiu zorgos pri la dua esplorado devas scipovi la lokan lingvon por sukcese intervjui la lernantojn ekde la unua momento.